

Esperanto 253

aktuell

38. Jahr (2019) №1 (253)



Informationen für Esperantofreunde in Deutschland und Österreich

- Rakoen Maertens prezentis dum LUMINESK' Unesko-kurieron
- KAEST 2018 en Modra, Slovakio
- Zamenhoffesto en Vieno
- BEMI-Semajno ● Mitglieder-
versammlung des Deutschen
Esperanto-Bundes ● Ist Esperanto
eine "lebende" Sprache? ● El
bibliotekoj kaj arkivoj ● La 4-a
LUMINESK' en Königswinter
- Intervjuo: BET-55. ● Junulara
Esperanto- Semajno en Storkow



Deutscher Esperanto-Bund e.V.

Germana Esperanto-Asocio r.a.

Amtsgericht Berlin VR 13651 B

www.esperanto.de/deb (Netzpräsenz)

gea.eo.tel (Kontakt Daten)

Bankkonto (por membrotizoj kaj donacoj) /

Bankverbindung (für Mitgliedsbeiträge

und Spenden): HELADEF1ERB,

Sparkasse Odenwaldkreis,

DE 3250 8519 5200 4011 4571.

Spenden und Mitgliedsbeiträge für den

D.E.B. sind steuerlich abzugsfähig.

Oficejo / Geschäftsstelle:

Esperanto-Laden

Katzbachstr. 25, 10965 Berlin,

Leitung: *Sibylle Bauer*

030 / 5106 2935, 0800 336 3636

Fax: 030 / 4193 5413

sibylle.bauer@esperanto.de

Membropriorgado / Mitgliederbetreuung

DEB: 0800 - 3 36 36 36 - 21

DEJ: 0800 - 3 36 36 36 - 22

Briefpost senden Sie bitte, soweit keine andere

Anschrift angegeben, an die Geschäftsstelle. Sie

wird von dort elektronisch weitergeleitet. Die

angegebenen **Telefon-Durchwahlnummern**

sind nach der Rufnummer **0800 - 3 36 36 36** zu

wählen.

Estraro GEA / Vorstand DEB

Netzpost an / retmesaĝo al gea.fe@esperanto.de

Jedes Vorstandsmitglied ist individuell erreichbar

per E-Post-Adresse in der Form

vorname.name@esperanto.de.

Siehe auch estraro.gea.eo.tel

Prezidanto / Vorsitzender

Ulrich Brandenburg, Durchwahl: -5111

gea.prezidanto@esperanto.de

Vicprezidanto / Stellv. Vorsitzender

Andreas Emmerich, Durchwahl: -5112

Trezoristo / Kassenwart

D-ro Matthias Hecking, Durchwahl: -5113

Landaj ligoj / Landesverbände

Wolfgang Bohr, Durchwahl: -5114

Administrado / Verwaltung

Barbara Brandenburg

Publika agado kaj pliklerigado /

Öffentlichkeitsarbeit und Weiterbildung

Oliver Walz, Durchwahl: -5116

Retpaĝo, dissendolistoj / Internetauftritt,

Mailinglisten

Julia Noe, Durchwahl: -5117

Kongresoj kaj renkontiĝoj / Kongresse und

Treffen

Andreas Diemel

IT-aferoj / IT-Fragen

Franz Kruse

Jugendvertreterin / GEJ-komisiito

Cornelia Luszczek, Durchwahl: -5118

Germana Esperanto-Junularo /

Deutsche Esperanto-Jugend

Michaela Stegmaier, Durchwahl: -5121

gej.prezidanto@esperanto.de

Komisiitoj / Beauftragte

esperanto.de/deb/beauftragte

Siehe auch gea.eo.tel

Verantwortliche für Presse- und

Öffentlichkeitsarbeit

Louis von Wunsch-Rolshoven,

Durchwahl: -111 • Fax Durchwahl: -112

louis.von.wunsch-rolshoven@esperanto.de

D-ro/Dr. Rainer Kurz, Plettenbergstr. 19,

70186 Stuttgart, 0163-3873785,

rainer.kurz@esperanto.de

Komisiito por rondvojaĝoj/ Verantwortlicher

für Rundreisen

Uli Ender, uli.ender@esperanto.de

Medienecho

Hermann Kroppenber, Durchwahl: -5121

medienecho@esperanto.de

Libroservo / Bücherdienst

D-ro / Dr. *Wolfgang Schwanz*,

Pfarrer-Seeger-Str. 9, 55129 Mainz, Durchwahl:

-5122, buchversand@esperanto.de, www.esperanto.de/buchversand

Kontaktadresoj / Kontaktadressen

Julia Noe, Bergiselstraße 3, 79111 Freiburg

Pliaj adresoj / Weitere Adressen

Germana Esperanto-Junularo (GEJ) /

Deutsche Esperanto-Jugend (DEJ)

Katzbachstr. 25, 10965 Berlin,

030/4285 7899, Fax: 030/4193 5412

www.esperanto.de/gej (Netzpräsenz)

gej.eo.tel (Kontakt Daten)

Interkultura Centro Herzberg (ICH) /

Bildungszentrum des D.E.B.

Komisiitoj/Beauftragte: *Zsófia Kóródy*

(instruado), *Peter Zilvar* (klerigado kaj kulturo),

Grubenhagenstr. 6, 37412 Herzberg, die

Esperanto-Stadt, 05521/5983, Fax (05521) 1363,

Durchwahlen: -411 (Tel), -412 (Fax),

ich@esperanto.de, www.esperanto.de/ich

Germana Esperanto-Instituto /

Deutsches Esperanto-Institut

Prof. D-ro/Dr. *Martin Haase*, Lehrstuhl für

Romanische Sprachwissenschaft,

Uni Bamberg, Durchwahlen: -431 (Tel),

-432 (Fax), martin.haase@esperanto.de,

www.esperanto.de/dei

Germana Esperanto-Biblioteko /

Deutsche Esperanto-Bibliothek

p/a. *Karl Heinz Schaeffer*, Schulstr. 17, 73432

Aalen, Durchwahlen: -421 (Tel), -422 (Fax)

biblioteko@esperanto-aalen.de; [bibliothek-](http://bibliothek-aalen@esperanto.de)

www.esperantobibliothek.de

Fondaĵo FAME / FAME-Stiftung

Andreas Emmerich, estraro@fame-stiftung.de

(nur por FAME)

Stiftung Mondo

Hauptstr. 42, 64753 Brombachtal,

030/6920 4846-1, stiftungmondo@gmail.com,

Bankkonto: 151100004, Volksbank Stuttgart eG, BLZ 600 901 00.

Spenden sind steuerlich abzugsfähig.

Aŭstria Esperanto-Federacio /

Österreichischer Esperanto-Verband

aef@esperanto.at, www.esperanto.at

Aŭstria Esperanto-Junularo /

Österreichische Esperanto-Jugend

Weissgerberlande 30-36/5/11, 1030 Wien,

aef@esperanto.at, <http://aef.esperanto.at>

Esperantomuzeo Vieno /

Esperantomuseum Wien

Palais Mollard, Herrngasse 9, 1010 Wien,

+43/1/53410-731, Postanschrift: Österreichische

Nationalbibliothek, Josefsplatz 1, Postfach 25,

1015 Wien, plansprachen@onb.ac.at, www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/index.htm

UEA-ĉefdelegitoj kaj perantoj / Bundes-

beauftragte des Esperanto-Weltbundes UEA

Germanio / Deutschland

D-ro / Dr. *Wolfgang Schwanz*, Adressen siehe

mittlere Spalte: Libroservo/Bücherdienst

Aŭstrio / Österreich

Leopold Patek, Martinstr. 104/38,

3400 Klosterneuburg, Poŝtel. +43/66473611289,

aon.913548977@aon.at

Esperanto aktuel

ISSN 0942-024 X

Eldonisto / Herausgeber

Deutscher Esperanto-Bund e.V.,

der Vorsitzende (v.i.S.d.P.)

Redaktista teamo / Redaktion:

Stano Marček (Martin/Slovakio),

Yashovardhan Singh, Im Johannistal 23, 42119

Wuppertal. Durchwahl: -541

Kunlaborantoj / feste Beiträger:

Uwe Stecher (Österreich, El la mondo),

Hermann Kroppenber (Medienecho),

Utho Maier (Bibliothek), Peter Zilvar (ICH)

Presejo / Druck

Alfaprint, Martin, Slovakio

Esperanto aktuel kun *-kune-* havas ses

numerojn jare kaj estas abonebla ĉe la oficejo

(vidu maldekstre supre) por 18 €

(de eksterlando: 24 €) jare.

Esperanto aktuel mit *-kune-* erscheint

sechs Mal pro Jahr. Abonnierbar bei der

Mitgliederbetreuung (s.o.). Abonnement: 18 €

(Ausland: 24 €) jährlich; für ordentliche

Mitglieder im Beitrag enthalten.

Anoncoj / Anzeigen:

Skribu al / Schreiben Sie an: deb@esperanto.de

Kontribuoj / Beiträge

Bv. sendi viajn kontribuojn (en formato * doc a.s.)

al ea@esperanto.de, por n-ro 2019/2 ĝis la 15-a

de marto 2019. Paperaj kontribuoj nur esceptkaze,

tiam al *Yashovardhan Singh* (vidu supre). Senden

Sie Ihre Beiträge bitte (im Format * doc o.ä.) an

ea@esperanto.de,

für Nr. 2018/3 bis zum 15. Mär 2019.

Papierbeiträge nur im Ausnahmefall, dann

an *Yashovardhan* (s.o.).

Karaj legantoj,

ni ĉiuj konas la demandon, kiom da homoj en la mondo (aŭ en Eŭropo aŭ en Germanio) parolas Esperanton. Mi kutimas respondi, ke neniuj estas devigataj registriĝi kiel Esperanto-parolanto, same kiel lernado de la ĉina lingvo aŭ pianludado ne devigas ie enskribiĝi aŭ membriĝi en asocio. En la tipa konversacio sekvas la kutimaj taksoj: eble 1-2 milionoj en la tuta mondo eklernis nian lingvon, ĉirkaŭ 100.000 ĝin almenaŭ okaze uzas aŭ iam uzis, kaj nur kelkaj dekmil membras en asocioj. Pri tiu diskuto mi ĉiam devas memori, kiam mi konatiĝas kun personoj en Esperantujo (eĉ kelkaj el niaj aktivuloj de la loka ĝis la tutmonda nivelo), kiuj pro diversaj kaŭzoj ne troviĝas en la membrolisto de la organizita movado. Tion oni devas respekti, kaj mi konscias, ke hodiaŭ mi direktas min al la jam konvinkitaj: al la membroj de niaj asocioj kaj la abonantoj de la revuo. Mi tamen daŭrigas, ĉar de tempo al tempo utilas refoje certiĝi pri la utileco de organizitaj strukturoj en la esperantista komunumo.

Kiel pluraj el vi mi pasigis la jarfinanajn tagojn inter esperantistoj. Mi ĉeestis la 4-an Luminesk'-renkontiĝon, organizitan de GEA, ĉi-foje en Königswinter, kun 65 partoprenantoj. Dum unu tago mi ankaŭ vizitis la 17-an Novjarian Renkontiĝon (NoRo). Ĝin tradicie organizas teamo sub gvido de Lu von Wunsch-Rolshoven ("Esperantoland"), ĉi-silvestre en Wiesbaden kaj denove kun pli ol 200 partoprenantoj. Samtempe en Storkow apud Berlin okazis la 10-a Junulara Esperanto-Semajno, organizita de Germana Esperanto-Junularo, kune kun la pola partnera asocio PEJ, ankaŭ ĝi kun pli ol 200. Vi trovos raportojn pri ĉiuj tri renkontiĝoj en ĉi tiu eldono – se ili alvenos ĝustatempe antaŭ redaktado – kaj eble ankaŭ kunmeton de la eĥo, kiun ili ricevis en gazetoj, radio kaj televido. Ĉirkaŭ 500 Esperanto-parolantoj do kunvenis paralele en tri lokoj de Germanio. Mi ankoraŭ memoras la 70-ajn jarojn, kiam je tiu tempo de la jaro ekzistis nur la Internacia Seminario de GEJ, al kiu venis inter 50 kaj 100 personoj.

Organizi tian renkontiĝon – same kiel kongreson – estas giganta fortostreĉo: grandan dankon do al la respondeculoj! Ili kreis la kondiĉojn por ke denove dum kelkaj tagoj ekvivu la Esperanto-komunumo en la reala – ne virtuala – mondo. Disponigi tiajn okazojn estas

unu el la taskoj de la organizita movado: ĝia bonstato tial ne povas esti egala al ni. Solidan bazon ni ankaŭ bezonas por plene utiligi la eblecojn de la reto (kion ni hodiaŭ pro manko de laborfortoj nur parte sukcesas), por ĉiam denove informi pri la ekzisto de niaj lingvo kaj komunumo, por kundiskuti pri lingva egalrajteco kaj komunikado sen diskriminacio, por kontraŭi antaŭjuĝojn. Solida bazo signifas, ke la asocia vivo, la administrado, la informado kaj instruado devas funkcii. En GEA ni intertempe sukcesis inversigi la tendencon de ĉiujaraj deficiitoj, fide kontroli en- kaj elspezojn kaj restarigi funkciantan membroadministradon. Aliaj gravaj taskoj ankoraŭ restas plenumendaj kaj atendas volontulojn. Kunigi niajn fortojn kaj organizi nian kunlaboron plej efike eblas per la strukturoj de funkcianta movado.

La ĵus pasintaj renkontiĝoj kaj la preparoj por la nun venontaj (por GEA: la Printempa Semajno Internacia en Hochspeyer kaj la Germana Esperanto-Kongreso en Neumünster) memorigas pri alia simpla fakto. Ni povas elspezi nur tiom, kiom ni enspezas. Por internacia junulara kunlaboro ja ekzistas subvencieblecoj el publikaj fontoj. Por "plenkreskulaj" aktivecoj la subvencifontoj estas tre limigitaj kaj malpli fidindaj. Firme enkalkuli ni povas nur la partoprenkotizojn kaj la rezervecojn de la asocio, kiu financas sin per membrokotizoj kaj donacoj. Estas facile demandi pri rabatoj, honorarioj kaj repago de vojaĝkostoj. En kelkaj kazoj kaj por escepte gravaj kontribuoj tio estas pravigebla aŭ eĉ necesa. Sed financia deficiito de renkontiĝoj ne estas la unuavica celo, por kiu niaj membroj pagas (sufiĉe altajn) kotizojn kaj malavare donacas. Tio signifas: rabatoj kaj aliaj elspezoj povas nur esti financataj el la poto, al kiu kontribuas ĉiuj partoprenantoj, kaj neeviteble altigas la partoprenkotizojn. Mi ne volas sonigi alarmon, sed miaj kolegoj en la estraro, la PSI-teamo kaj mi mem, lastatempe pasigis multe da tempo per kalkulado...

Do: restu fidelaj al ni, partoprenu kaj pagu kaj konvinku aliajn membriĝi! Mi ĝojas revidi nin ĉi-jare ĉu surloke, ĉu dum unu el la menciitaj renkontiĝoj, ĉu dum la Universala Kongreso en Finnlando. Ĉion bonan por la resto de la jaro deziras al vi

Ulrich Brandenburg
Prezidanto de GEA

Enhavtabelo/Inhalt

1: Rakoen Maertens prezentis dum LUMINESK' Unesko- kurieron (p. 21).
Foto: Liba Gabalda

2: Adresoj

3: Germana Esperanto-Asocio:
Karaj legantoj! Enhavtabelo.

4-6: Aŭstria Esperanto-Federacio: KAEST
2018 en Modra, Slovakio. Zamenhoffesto
2018-12-08 en Vieno, en Pola Instituto

7-9: Interkultura Centro Herzberg:
BEMI-Semajno. Australische Wissenschaftlerin forschte in Herzberg. Datoj / Termine im Esperanto-Centro. GEA-Filio por Klerigado kaj Kulturo en Herzberg invitas

10-13: Germana Esperanto-Asocio:
Mitgliederversammlung des Deutschen Esperanto-Bundes am 9. Juni 2019 in Neumünster

14-15: Medienecho.

16: Ŝerca silaboeningmo

17-18: Artikolo pri Esperanto:
Ist Esperanto eine "lebende" Sprache? Solvo de la ŝerca silaboeningmo el la p. 18

19: El bibliotekoj kaj arkivoj:
Folge 43 – "Ist es nun tot, das Buch?" – angesichts der neuen Medienlandschaft

20: Kalendaro

21-23: Esperanto-renkontiĝoj: La 4-a LUMINESK' en Königswinter 27.12.2018-3.1.2019. Esperanto-Neujahrstreffen und Internationale Neujahrwoche in Wiesbaden. 35-a Printempa Semajno Internacia

24: Intervjuo: BET-55: 60 jaroj en Esperantujo

25-31: -kune- – revueto de Germana Esperanto-Junularo: Junulara Esperanto-Semajno proksime al Berlino en Storkow. Protokoll zur Jahreshauptversammlung der Deutschen Esperanto-Jugend (DEJ) e. V. Fahrtkostenzuschüsse für Jugendtreffen, 2019. Estontaj okazaĵoj de GEJ. Krio por etoso (Hirschluch). Bonvenon al libera Esperanto-kantaro! La VIPoj. Kassenprüfbericht 2018. Anwesenheitsliste Pri 10-a JES.

30. Ni funebras (Nora Karagea). Nova Plena Vortaro Esperanto-Germana / Vollständiges Wörterbuch Esperanto-Deutsch

31: Novaperintaj libroj.

32: Fotoj de Liba Gabalda el la 4-a LUMINESK' en Königswinter 27.12.2018-3.1.2019

KAEST 2018 en Modra, Slovakio

Jam ekde 40 jaroj ekzistas KAEST, Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko. Gratulindas Peter Baláž kaj lia teamo, kiu nun inter la 18a-21a de oktobro jam la trian fojon okazigis tiun scian konferencon en Modra-Harmónia, Slovakio.

En antaŭaj jaroj organizis tion Petr Chrdle. Kelkdekoj da sciencaj prelegoj kaj prezentadoj en Esperanto estis donitaj. Tie kunvenis 70 gepartoprenantoj kun aparte rimarkinda kaj aktiva juna populacio sciencista (vidu la foton).

La aŭstraj partoprenantoj kontribuis per jenaj prelegoj dum KAEST 2018:

Richard Hable: "Ĉu pure funkciaj programlingvoj finvenkos?" Jam dum jardekoj ekzistas modernaj pure funkciaj programlingvoj kiel alternativo al la konvenciaj ordonemaj kaj objektemaj programlingvoj. Kaj kvankam ĝis nun nur malmultaj programistoj uzas tiujn programlingvojn, dum la lastaj jaroj multaj ekzistantaj programlingvoj estis plivastigitaj por subteni almenaŭ unuopajn funkciajn konceptojn.

La preleganto esploris avantaĝojn de pure funkciaj programlingvoj, sed ankaŭ la malfacilaĵojn de ilia apliko. Li prezentis proponon por pli facila programlingvo, kiu baziĝas sur konataj konceptoj de objektemaj programlingvoj kaj tamen retenas la ĉefajn avantaĝojn de pure funkciaj programlingvoj.



Hans Michael Maitzen kaj Alfred Heiligenbrunner

Alfred Heiligenbrunner: "La nombro Pi (π): historio, formuloj, algoritmoj". Cirkloj, elipsoj, sferoj, elipsoidoj, konusoj: en ĉiu ronda objekto aperas tiu rimarkinda nombro 3,14..., kiun ni nomas Pi (π). Krom en geometrio, ankaŭ en statistiko, en nombroteorio, en analizo ĝi aperas. Kion ni scias pri ĝi? Kion sciis niaj antaŭuloj? Ni ricevis superrigardon dum tiu mallonga prezentado.

Hans Michael Maitzen: "HIP 60350 – la plej rapida stelo de la Laktvoja disko". Jen paradigmo por atingo de scienca malkovro, bazita sur nekonvencia procedado



de la esploristoj. Tiunmaniere estis trovita la ĝis nun plej alta rapideco de stelo juna, kiu naskiĝis antaŭ nelonge, kelkdek milionoj da jaroj en nia galaksia disko, dudek mil lumjarojn for de ni. Niaj surteraj mezuroj de la Doppler-a rapideco, kune kun la transversa moviĝo surĉiela de tiu stelo, provizita de la astrometria satelito Hipparcos, indikas rapidecon de 1,5 milionoj da kilometroj hore rilate al nia galaksio, montrante eblecon, ke la stelo eĉ eskapos el la laktovoja sistemo kaj proksimiĝos al la najbara Andromedo-galaksio, en distanco de du milionoj da lumjaroj.

Partoprenis ankaŭ Bernhard Tuider, la teamestro de la Esperanto-Muzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko.

Resume oni konstatis, ke KAEST evoluis dum sia 40-jara ekzisto al unu de la plej fortaj kolonoj de scienca agado/interŝanĝo pere de Esperanto tutmonde.

Bondezirojn al plua prospero!

**Hans Michael Maitzen
kaj Alfred Heiligenbrunner**

Zamenhoffesto 2018-12-08 en Vieno, en Pola Instituto

Aŭstria Esperanto-Federacio (AEF) kaj Pola Instituto en Vieno okazigis jam tradician Zamenhoffeston 2018 en Vieno, en Pola Instituto. Vizitis ĝin kvindeko da personoj.



Foto: Alfred Heiligenbrunner

La aĝo de la partoprenantoj tre variis. Ĉeestis la 97-jara Herta Niessner el Vieno kaj la 19-jara Václav Loučka el Prago. La hejmaj landoj de la partoprenantoj estis: Aŭstrio, Ĉeĥio, Francio, Irlando, Italio kaj Pollando.

La programo konsistis el pluraj paroloj kaj prezentadoj:

* Rafał Sobczak, direktoro de la Pola Instituto Vieno, salutis kaj bonvenigis. Li atentigis, ke Pollando festas ĉi-jare la centjariĝon de sia sendependeco (11.11.1918).

* Martin Stuppnig parolis pri sia libro "Home en senhometo". Stuppnig (naskita 1925) kiel 18-jarulo estis vokita en la nazian armeon Wehrmacht. En tiamaj Jugoslavio kaj Italio (Monte Cassini) li plurfoje estis vundita kaj kiel angla militkaptito deportita al Afriko. Pri siaj travivaĵoj dum la dua mondmilito li verkis la libron "Menschlich in der Unmenschlichkeit". La traduko al Esperanto nomiĝas "Home en senhometo". Tradukoj al la ĉeĥa kaj al la itala lingvo estas preparataj. Profesie fervojisto li ankaŭ estas tre aktiva esperantisto. La germanlingva originalo jam aperas en dua eldono, ĉar la 300 ekzempleroj de la unua eldono jam elĉerpiĝis.

* Seán Ó Riain prezentis siajn pensojn pri 70 jaroj da homaj rajtoj kaj la implicoj al neŭtralaj lingvoj kiel Esperanto.

Temis pri la 70-jariĝo de la Universala Deklaro pri Homoj Rajtoj, adoptita fare de UN en Parizo la 10-an de decembro 1948, kaj li substrekis la blindecon de UN al lingvaj rajtoj.

La deklaro malpermesas ian ajn diskriminacion, ankaŭ je lingvo, sed UN agnoskas nur ses oficialajn lingvojn: la anglan, la araban, la ĉinan, la francan, la hispanan kaj la rusan. Tiujn ses lingvojn parolas denaske proksimume 2.5 miliardoj da homoj, triono de la homaro. La oficialaj reprezentantoj de tiu



Franziska Dodik, Adam Czartoryski, Bernhard Tuider,
Hans Michael Maitzen, Norina Florineth kaj Alfred Heiligenbrunner.
Foto: Alfred Heiligenbrunner

triono havas privilegion ĉiam povi paroli en la denaska lingvo dum oficialaj kunvenoj, sed la reprezentantoj de du trionoj neniam havas tiun privilegion. La parolanto komparis tiun blindecon al la blindeco de homoj dum pasintaj jarcentoj, kiuj ne vidis la maljuston de neagnoskado de plenaj homaj rajtoj al nigrujoj, judoj aŭ al virinoj.

Esperanto, kiu garantias lingvan samrajtecon al ĉiuj, progresas malrapide, sed certe. La parolanto demandis kial Esperanto devus progresi pli rapide ol la kristanismo, kiu nur post tri jarcentoj iĝis la religio de la romia imperiestro Constantinus (Konstanteno).

Seĉn substrekis la tre longan mankon de lingvaj rajtoj en sia lando Irlando. La unuaj leĝoj kontraŭ la irlanda lingvo estas de 1366, la Statutoj de Kilkenny. Unu el tiuj leĝoj postulis, ke “ĉiu anglo en Irlando devas lerni la anglan lingvon, kaj se rifuzas, estos traktata kiel irlanda malamiko” (t.e., la registaro forprenos lian bienon). En 1882 nekulpaj irlandano Maolra Seoighe estis malprave akuzita je murdo. Li ne komprenis la anglan kaj provis sin defendi en la sola lingvo kiun li konis – la irlanda. Ĉar la angloj ne agnoskis la irlandan, la sekretario de la kortumo skribis “li diris nenion”. Kvankam du el la murdistoj ĵuris, ke Maolra estas senkulpa, kaj ne estis kun ili kiam ili faris la murdon, Maolra estis pendumita en Galway la 15-an de decembro 1882, dum la zamenhofa naskiĝtago!

Seĉn finis la paroladon per kantado de Eŭropa Himno en Esperanto – la tuta ĉeestantaro kunkantis.

* Hans Michael Maitzen parolis pri la vivo de Bertha von Suttner (1843-1914), okaze de la 175-a datreveno de ŝia naskiĝtago.

Antaŭ 175 jaroj naskiĝis la 9-an de junio 1843 en Prago Bertha Sophia Felicita baronino von Suttner, tiam grafino Kinsky von Wchinitz und Tettau, kiel filino de Franz Joseph grafo Kinsky, kiu en aĝo de 75 jaroj mortis antaŭ ol ŝin naskis la patrino Sophie Wilhelmine, nask. von Körner. La familia ĉirkaŭo enhavis aristokratajn militistojn tipe por la aŭstro-hungara monarkio.

Kiam la heredaĵo elĉerpiĝis, al kio kontribuis la kazino-ludemo de la patrino, Bertha ekdeĵoris 1873 kiel hejminstruistino ĉe la industriisto barono Karl von Suttner en Vieno. Tiam ŝi

enamigis al la plej juna filo de la familio Arthur Gundaccar. Li estis sep jarojn pli juna ol ŝi. En 1876 ŝi veturis al Parizo, kie ŝi estis privata sekretariino de Alfred Nobel. Per tio la patrino de Arthur klopodis finigi la amrilaton. Sed en junio samjare ŝi kaŝe edziniĝis al Arthur, kiu sekve estis senheredigita. La edzoparo fuĝis al Georgio (2300 km for!) kaj pasigis 8 jarojn tie kun ŝanĝantaj profesiaj aktivecoj, ekz. ĵurnalistaj. En 1885 ili revenis al Vieno, repaciĝis kun la familio kaj ekloĝis en ties kastelo en Harmannsdorf.

Bertha daŭrigis siajn ĵurnalistajn aktivecojn kun akcento al pli paca socio, kiu tiutempe estis nova temo en la internacia vivo. Kulminis tio, kiam ŝi en aŭtuno de 1889 publicis la pacifisman romanon “Die Waffen nieder!” (For la Batalilojn!), kiu igis ŝin unu el la plej elstaraj reprezentantoj de la pacmovado. Tie ŝi priskribis la teruron de la milito el la vidpunkto de edzino.

La 10-an de decembro 1905 Bertha von Suttner ricevis la de ŝi iniciatitan nobelpremion pri paco, transdonita la 18-an de aprilo 1906 en Kristiania (Oslo). Tie ŝi proponis tutmondan pacunion kaj internacian kortumon. En la sekvaj jaroj ŝi daŭre avertis pri la danĝeroj de la kreskanta armado industria, kondukanta al monda milito. La 21-an de junio 1914, kelkajn semajnojn antaŭ la eksplodo de la Unua Mondmilito, ŝi mortis en Vieno, sekve de kancera malsano. Ŝia urno troviĝas en la germana urbo Gotha.

Ŝiajn lastajn vortojn: “For la batalilojn – diru ĝin al multaj, multaj!” transdonis Alfred Hermann Fried, ŝia kunaganto kaj ankaŭ pacnobelpremiito, en sia nekrologo al la mondo. Li estis aktiva esperantisto kaj kontribuis al la Esperanto-favora sinteno de Bertha von Suttner. Hans Michael Maitzen naskiĝis 100 jarojn post Bertha von Suttner.

* Chuck Smith prezentis rakontojn kaj statistikojn pri Vikipedio, Duolingo kaj Amikumu.

Inter alie ni lernis, ke la Ĉeĥa Vikipedio, kreita en la jaro 2000, originis de la Esperanta Vikipedio.

Per Duolingo pli ol miliono lernas Esperanton nuntempe el la angla, hispana kaj portugala. Tio vere estis revolucio por la movado, speciale en anglalingvaj landoj kiel Usono kaj Britio.

Ĝi krome enkondukis al bezono de servo por trovi esperantistojn proksime, telefona apo, kiu nomiĝas Amikumu. Chuck kun sia skipo laboradis pri tio kaj nun pli ol 15.000 homoj uzas ĝin en 135 landoj kaj ili entute parolas 500 lingvojn! Ni krome ĝojas, ke tiu projekto ne subtenas nur Esperanton, sed ankaŭ multegajn aliajn lingvokomunumojn.

Post la oficiala parto la gastoj havis la eblecon interbabili ĉe bufedo, kun kuketoj, pano, suko kaj vino. Bedaŭrinde la organizantoj devis fini la aranĝon jam je 19:30. Tio malebligis babilati kun ĉiuj de la multaj interesaj personoj.

La esperantisto Amir afable ŝoforis sinjorinon Niessner al la festo kaj reen.

Ni antaŭenrigardas al la venonta, ĉi-jara Zamenhoffesto.

Dankon meritas la Pola Instituto, precipe la direktoro Mag. Rafał Sobczak kaj la projektgvidanto Mag. Adam Czartoryski.

Alfred Heiligenbrunner

Ligiloj: Zamenhoffesto el vidpunkto de la Pola Instituto Vieno: <http://www.polnishes-institut.at/7,1,414>; Bertha von Suttner: https://eo.wikipedia.org/wiki/Bertha_von_Suttner; Juĝeraro en Irlando pro lingvaj problemoj: https://en.wikipedia.org/wiki/Maolra_Seoighe



Alfred Heiligenbrunner kaj Herta Niessner, longjara esperantistino el Vieno (97-jara).

Foto: Adam Czartoryski de la Pola Instituto

BEMI-Semajno

Biciklista Esperantista Movado Internacia (BEMI) invitas ĉiujn ŝatantojn de biciklado al sia BEMI-semajno en Herzberg am Harz, la Esperanto-urbo.

Datoj: de sabato, la 22-a ĝis dimanĉo, la 30-a de junio 2019.

Programo:

Sabato estos alventago, dimanĉo forirtago.

En ĉiu el la sep aliaj tagoj ni ekskursos bicikle tra la tre varia pejzaĝo ĉe la piedo de la Harz-montaro kaj vizitos diversajn vidindaĵojn.

Atendas vin kavernoj, rokformacioj, kasteloj, monaĥejoj, fontoj, naturprotektaj centroj, minejoj, muzeoj kaj aliaj interesaj lokoj.

Ni planas ekskursojn je diversaj distancoj kaj gradoj de malfacileco, tiel ke la partopreno estu inda kaj por tiuj, kiuj preferas ĝui facilajn biciklopromenojn, kaj por tiuj, kiuj ŝatas sportajn defiojn.

Eventuale ni formos du grupojn, kiuj jen ekskursos kune, jen aparte.

El la preparitaj ekskursoj ni elektos surloke laŭ vetero.

Ni zorgos mem pri niaj manĝoj, tial ankaŭ komuna preparado, kuirado, lavado, purigado ktp. estos parto de la programo.

Kaj ni ĝojus, se vi en la vesperoj rakontus aŭ prelegus pri viaj biciklovojaĝoj, pri biciklaj kondiĉoj en via lando, pri trafika politiko aŭ aliaj biciklorilataj temoj.

Loĝado:

Ni loĝos en propraj tendoj, en la ĝardeno de la Interkultura Centro, Grubenhagenstraße 6, 37412 Herzberg am Harz – La Esperanto-urbo.

Bonvolu indiki kun via aliĝo, ĉu vi venos kun propra tendo, kaj kiom da lokoj estas eventuale liberaj en ĝi; aŭ ĉu vi bezonas lokon en tendo de alia partoprenanto.

En la konstruaĵo ni disponos pri necesejo, duŝejo kaj kuirejo kun fridujo, forno, kuiriloj, manĝiloj kaj vazaro.

Al tiuj, kiuj nepre ne volas tendumi, eblas sendi liston de hoteloj kaj ferio-apartamentoj.

Kiel alveni:

La germana fervojo havas du staciojn en Herzberg, ĉe kiuj haltas regionaj trajnoj ĉiuhore: la stacion Herzberg(Harz) sur la linio RB81 Northeim-Nordhausen kaj la stacion Herzberg Schloß sur la linio RB46 el Braunschweig.

En ĉiuj regionaj trajnoj en Germanujo eblas kunporti biciklojn, kutime kontraŭ aldona pago. En la longdistancaj IC-kaj EC-trajnoj ĝenerale eblas kunporti biciklojn, sed nur post antaŭa rezervado. En ICE-trajnoj ĝenerale ne eblas kunporti biciklojn, se tamen jes, same nur post rezervado. Se vi volas veni trajne kaj bezonas konsilojn pri tarifoj, ni volonte donos.

Se vi volas veni tute aŭ parte per biciklo, ni povas rekomendi itineron. Se vi deziras partopreni, sed ne povas kunpreni vian biciklon, skribu al ni, kaj ni serĉos por vi biciklon por prunti aŭ lui.

Kotizo:

En la kotizo enestas:

- Sep tranoktoj en propra tendo.
- Uzo de necesejo, duŝejo kaj kuirejo en la Interkultura Centro.
- Matenmanĝoj kaj vespermanĝoj, kiujn ni mem preparos, en la Interkultura Centro. La unua manĝo estos vespermanĝo en sabato la 22-an, la lasta manĝo estos matenmanĝo en dimanĉo, la 30-an de junio.
- Manĝetoj kiujn ni preparos kaj kunportos dum la ekskursoj.
- Enirbiletoj al la kastela muzeo en Herzberg (kun Esperanto-fakekspozicio).

En la kotizo ne enestas:

- Trinkaĵoj.
- Eventualaj elspezoj en kafejoj aŭ restoracioj dum la ekskursoj.
- Enirbiletoj al muzeoj ktp. dum la ekskursoj.

Via aliĝo estos valida post antaŭpago de almenaŭ 20 € al jena konto:

IBAN: BE56 0018 5350 4288

BIC: GEBABEBB

Aliĝdatoj/Kotizoj

ĝis 2019-01-15: 88€ (ĝis 26 jaroj); 104€ (super 26 jaroj)

ĝis 2019-04-15: 92€ (ĝis 26 jaroj); 111€ (super 26 jaroj)

ĝis 2019-06-15: 97 € (ĝis 26 jaroj); 121€ (super 26 jaroj)

poste: 102 € (ĝis 26 jaroj); 132€ (super 26 jaroj)

Aliĝilo

Nomo:

Retpoŝtadreso:

Loĝado:

- Mi loĝos en propra tendo
- Mi bezonas lokon en tendo de alia partoprenanto
- Mi preferas loĝi en hotelo aŭ apartamento, bonvolu sendi liston

Se vi kunhavas propran tendon, kiom da lokoj estos en ĝi liberaj?

Mi konsentas, ke miaj datumoj estu elektronike konservataj por la celo organizi la BEMI-semajnon *

Mi konsentas, ke fotoj aŭ filmetoj, en kiuj mi aperas, publikigo en interreto. *

Kontakto: Se vi havas demandojn aŭ proponojn, skribu retroŝte al la organizanto Lars Sözüer: lars.duisburg@gmx.de

*) *Necesas jesa aŭ nea respondo.*

Australische Wissenschaftlerin forschte in Herzberg

Frau Prof. Anna Haebich von der Westaustralischen Universität fand im Internet "Herzberg am Harz...die Esperanto-Stadt". Die Idee der neutralen Brückensprache Esperanto gefällt ihr sehr. Sie steht seit längerer Zeit in Kontakt mit dem Herzberger Esperanto-Centro.

Die Wissenschaftlerin machte auf ihrer diesjährigen Forschungsreise in Göttingen und gerade auch in Herzberg Station, um sich etwas über Esperanto, Herzberg...die Esperanto-Stadt und die Strukturen zu informieren. Peter Zilvar informierte über Esperanto und bekannte esperantosprachige Autoren Australiens, z.B. Trevor Steele.

Die Professorin Anna Haebich ist auch eine sehr bekannte Buchautorin und hat viele Jahre bei den Aborigines verbracht und ihre ca. 300 bis ca. 600 verschiedenen Sprachen und Kulturen geforscht. Sie bedauerte es aus wissenschaftlicher Sicht sehr, dass Australien ein einsprachiges Land geworden ist. Damit sind viele Sprachen, die Kulturen und das reichhaltige angestammte Wissen, z.B. aus der Naturmedizin, verloren gegangen.



Ihre Eltern waren vor langer Zeit von Deutschland nach Australien ausgewandert. Ihr Vater war ein evangelischer Pfarrer, der zu Beginn noch Gottesdienste in deutscher Sprache abgehalten hätte.

Im Mittwochsclub des Herzberger Esperanto-Centros informierte sie die Anwesenden über ihr vielfältiges und großes Heimatland, Landschaften, Wirtschaft, Tourismusregionen und über die reiche Blumen- und Pflanzenwelt. Viele Fragen konnten unmittelbar beantwortet werden.

Gerade auch die besondere Pflanzenwelt Australiens interessiert sie sehr. Sie fand heraus, dass ein aus der Familie Preiss stammender ehemaliger Herzberger Bürger ein berühmter Botaniker in Australien wurde. Viele beschriebene und erforschte Blumen und Pflanzen Australiens tragen den Beinamen "Preissii". Die Professorin Anna Haebich ist auch eine leidenschaftliche Botanikerin und hofft im Herzberger Stadtarchiv noch Informationen über die Angehörigen der Familie Preiss, die wohl alle von Herzberg nach Australien ausgewandert waren, zu erfahren.

Zsofia Korody vom Esperanto-Centro führte die australische Forscherin durch das Herzberger Schlossmuseum mit der reichhaltigen Geschichte, z.B. über die Welfen, mit einem Besuch der verschiedenen Sonderausstellungen.

Da ihr Ehemann schwer erkrankt ist, konnte sie leider nur kurze Zeit in Herzberg bleiben. Ihre vielfältigen Eindrücke und Erfahrungen aus Herzberg will sie als Lektionen für ihre Studenten aufarbeiten.

Foto: Die Wissenschaftlerin Anna Haebich nach der Ankunft vor dem Herzberger Bahnhof (beim Esperanto-Platz)

Datoj / Termine

**im Esperanto-Centro Grubenhagenstr. 6,
DE-37412 Herzberg am Harz
– die Esperanto-Stadt**

**Tel. 05521-5983 E-Mail: esperanto-zentrum@web.de
stato: 10.01.2019**

Mittwochs ab 16:30 h Esperanto-Klub per LEB (evtl. Kursus, interessante Übersetzungstexte, Themen, Unterhaltung, Informationen, Gäste, Lieder), ICH

A) „Granda Tibor Sekelj-ekspozicio“ en la Muzeo de la Welf-Kastelo (ĝis 10a de februaro 2018, vizitinda)

B) Sonderausstellung “25 Jahre Städtepartnerschaft Herzberg am Harz & Góra/PL”

(gefördert durch Demokratie leben), Museum des Welfenschlosses (obere Plattform) in Herzberg

**2019: „Internationales Jahr
der indigenen Sprachen / UNO“**

08.02.19 (Fr) 19 h– 10.02.19 Esperanto-Wochenendkurse, Esperanto-Centro (ICH)

21.02.19 (Do) 19 h Internacia Tag der Muttersprachen, Ort zu erfragen

10.03.19 (So) 10:30 h Sitzung der Organe der Stiftung Esperanto-Stadt Herzberg, Rathaus

10.03.19 (So) 14:00 h Mitgliederversammlung der Esperanto-Gesellschaft Südharz, ICH

15.03.19 (Fr) 19:00 h Ein Abend über Ungarn (Kultur, Sprache, Regionen, Weinanbau), Ort zu erfragen

18.03.19 – 22.03.19 Bildungsurlaub "Esperanto" per VHS Göttingen in Herzberg

29.03.19 (Fr) 19 h– 31.03.19 DEB-Weiterbildungsseminar mit div. Fachvorträgen, ICH

Es kommt die Chefin der Fa. LINGOLIA, Heike Pahlow, die über den sehr erfolgreichen Netzkursus informiert.

Ca. 27.04. – 03.05.19 Eine Gruppe aus Schlesien/PL feiert mit uns "Valpurga Nokto"

03.05.19 19:00 Abend der polnischen Kultur und Literatur, ICH bzw. Ort zu erfragen

08.05.19 (Mi) 16:30 h Rostov am Don / RU, Vortrag von Prof. Alexander Melnikov, ICH

Im Frühjahr kommt ein europäischer E-Landesverband mit dem Bus in die Esperanto-Stadt Herzberg

21.05.19 (Di) 19:00 h– 22:00 h Welttag der kulturellen Vielfalt (Vortrag und Diskussion), ICH

07.06.19 – 10.06.19 (Pfingsten) Deutscher Esperanto-Kongress in Neumünster

23.06.19 - 30.06.19 Internacia E-Biciklista Semajno (kun interesaj t.n. "trifoliaj ekskursoj" en nia regiono / Internat. Esperanto-Radfahrerwoche in unserer Region (mit vielen "Kleeblattausflügen")

23.06.19 19h Informationsabend über Sprachen, Kulturen und Minderheiten in Europa, ICH

28.06.19 (Fr) 19 h – 30.06.19 DEB-Weiterbildungsmodul m. wissenschaftlichen- u. Fachvorträgen, ICH

07.07.19 – 21.07.19 Esperanto-Kurse für Erwachsene (Starter & Fortgeschrittene) und Familien

+ zusätzlich DEB-Weiterbildungsmodule (als Blockkurs) für künftige E-Manager, E-Lehrer und E.-Kursleiter

29.09.19 19h – 02.10.19 Esplor- kaj Kultursemajno pri "Esperanto-mono" kaj E-medaloj kune kun la prezidanto de la Esperanto-numismatikistoj Bert Boone el Belgio, ICH (kun speciala ekspozicio en la muzeo de la Welf-Kastelo)

03.10.19 – 06.10.19 TORPEDO, AGEI/GEA-Weiterbildungsseminar, ICH

01.11.19 – 03.11.19 DEB-Verbandsratssitzung in Herzberg am Harz – die Esperanto-Stadt

08.11.19 (Fr) 19 h Esperanto-Wochenendkursus, ICH

13.12.19 (Fr) 19 h– 15.12.19 DEB-Weiterbildungsseminar, Weihnachts- & Zamenhoffeier, ICH

15.12.19 (So) 10 Jahre „Dr. L.L. Zamenhof-Denkmal“ in Herzberg (Kl. Erinnerungsfest)

GEA-Filio por Klerigado kaj Kulturo en Herzberg invitas

**Ĝojige estas, ke nia eta klerigteamo trovis
du novajn kompetentajn geaktivulojn.**

Antaŭ kelkaj jaroj d-rino Anina Stecay kaj Martin Ptasiniski partoprenis unuopajn klerigmodulojn ĉe ni. Intertempe ili studadis en Poznano ktp. Ambaŭ ankoraŭ estas junaj kaj ili volas kunaktivi kaj kunkonstrui.

Certe estas multaj defioj por bonkvalite mastrumi la klerigestontecon kun kaj per niaj propraj spertoj, scioj, materialoj kaj ceteraj resursoj.

Jen kelkaj unuaj taskoj, ekz. ordigado kaj listigado de unika librokolektaĵo rilate lernado kaj klerigado. Ni volas produkti klerigfilmojn kun fakaj kaj sciencaj preleĝoj el multaj tembranĉoj. La estontaj klerigmaterialoj ankaŭ ebligos certgradan distancstudadon. Surloka legado /studado de fakaj libroj laŭ interkonsento preskaŭ ĉiam eblas.

Ni volas redakti resp. novredakti klerigkajerojn, ekz. pri Esperanto-Kulturo, Literaturo de Esperanto, Argumentado kaj Varbado, Interlingvistiko, Didaktiko kaj Metodiko, ktp.

Kune ni volas realigi multajn ideojn por majstri la pluklerigan estontecon, ĉar la Esperanto-movado bezonas verajn fakulojn. GEA membroj ricevas altan rabaton por la partoprenkotizoj.

Nepre ni rekomendas la ĉirkaŭ trijaran studadon (kun semajnfinaĵ studmoduloj). Ĉe la sukcesa fino de studprogramo kun ekzamenoj ktp. la partoprenantoj (gestudentoj) ricevas la ŝatatan GEA-diplomon, ekz. "Esperanto-instruisto/GEA".

Tio estas bona privilegio, ekzemple se vi volas instrui Esperanton ĉe popolaj altlernejoj, ĉe fakaj altlernejoj, fakultativa Esperanto-instruado en publikaj lernejoj ktp.

Bv. varbi por la venontaj klerigmoduloj, aŭ partoprenu mem. Certe vi kaj ni lernos multe kune.

Jen la datoj por la klerigmoduloj ĉe GEA-Filio en Herzberg am Harz...la Esperanto-urbo:

29.03.2019 – 31.03.2019

28.06.2019 – 30.06.2019

03.10.2019 – 06.10.2019 (TORPEDO), kune kun AGEI

13.12.2019 – 15.12.2019

Krome ni rekomendas unikan dusemajnan someran klerigseminaron por estonataj "Esperanto-kurstroj": 07.07.2019 – 21.07.2019.

Bv. noti kaj aliĝi! Dankon!

Mitgliederversammlung des Deutschen Esperanto-Bundes am 9. Juni 2019 in Neumünster

Liebe Mitglieder,

die nächste Bundesversammlung des Deutschen Esperanto-Bundes e.V. wird wie beschlossen im Rahmen des 96. Deutschen Esperanto-Kongresses (7. bis 10. Juni 2019) in Neumünster stattfinden. Alle Mitglieder des Deutschen Esperanto-Bundes sind zur Teilnahme herzlich eingeladen.

Ort: Tagungsort „Kiek in“, Gartenstr. 32, 24534 Neumünster

Zeit: Sonntag, den 9. Juni 2019, ab 9:00 Uhr

Vorgeschlagene Tagesordnung

1. Eröffnung
 - a) Begrüßung
 - b) Feststellung der Beschlussfähigkeit
 - c) Genehmigung der Tagesordnung
 - d) Wahl der Protokollführer und des Versammlungsleiters zu TOP 3 und 4 a)
 - e) Genehmigung des Protokolls der Bundesversammlung vom 20.05.2018 (siehe Esperanto aktuell 2018/4)
2. Berichte der Bundesorgane
 - a) Bericht des Vorstandes
 - b) Bericht des Schatzmeisters
 - c) Bericht der Rechnungsprüfer
3. Entlastung des Vorstandes
4. Wahlen zu den Bundesorganen
 - a) Wahl eines Vorsitzenden
 - b) Wahl weiterer Vorstandsmitglieder
 - c) Wahl eines von zwei Rechnungsprüfern
5. Haushaltsplan 2020 (siehe Esperanto aktuell 2019/1)
6. Behandlung von Anträgen (siehe Esperanto aktuell 2018/6 zu Anträgen des Vorstandes)
 - a) Datenschutzordnung
 - b) Satzungsänderung aufgrund der DSGVO
 - c) vereinfachte Mitgliedschaftskategorien
 - d) Beitragsordnung
 - e) Änderung der Förderrichtlinien
 - f) ggfs. weitere Anträge
7. Ort und Zeit der Bundesversammlung 2020
8. Verschiedenes

Anträge zur Bundesversammlung bitte ich rechtzeitig bei mir einzureichen. Soweit sie die Satzung, Beiträge oder Auflösung des D.E.B. betreffen, müssen sie mir lt. Satzung 3 Monate vor der Bundesversammlung vorliegen und spätestens 4 Wochen vor der Versammlung zirkuliert werden.

Ich freue mich, Sie im Juni in Neumünster begrüßen zu dürfen!

Berlin, im Februar 2019

gez. Ulrich Brandenburg, Bundesvorsitzender

D.E.B.-Haushaltsplan 2020

Einnahmen		
2109, 2110, 2111, 2112, 2113	Mitgliedsbeiträge	47 000 €
2420	Förderbeiträge	0 €
2112	Beiträge von Mitgliedsorganisationen, nur EBL.ORG	0 €
8004	Wareneinnahmen	0 €
4150	Zinserträge	0 €
3220	Spenden, allgemeine	0 €
	Summe	47 000 €
Ausgaben		
Geschäftsverkehr		
3248	Spenden, Internet	0 €
	Mitgliederverwaltung	-600 €
2700	Finanzbuchhaltung	-83 €
	Internet, Domains, Zertifikate	-700 €
2559	Personalkosten, Netto	-5 400 €
2543	soziale Aufwendungen	-1 674 €
2555	VBG Unfallversicherung	-120 €
2570, 2572	Reisekosten, allgemein und Katzbachstraße	-300 €
4712	Nebenkosten des Geldverkehrs	-50 €
2702	Telefon, Internet-Anschluss	-1 200 €
	AS-Infodienste (800er-Nr, Telefonkonferenz)	
2753	Versicherungen, Beiträge (Abgaben, Registergericht)	-700 €
2701	Büromaterial (Briefmarken, Druckertoner, ...)	-500 €
	Europa Esperanto-Unio	-400 €
2752	Aligitaj Membroj de UEA	-800 €
	Sonnenberg-Kreis e. V.	-60 €
2800	Mitgliederpflege	-100 €
2894	Rechts- und Beratungskosten	-300 €
2810	Repräsentationskosten (z. B. Ehrungen, Todesanzeigen)	-200 €
2900	Sonstige Ausgaben	0 €
	Summe	-13 187 €
Vorstandsarbeit		
3248	Spenden für Vorstandsarbeit	3 000 €
	Budget	0 €
2571	Reisekosten/Spesen/Unterbringung	-3 000 €
	Summe	0 €
Geschäftsstelle Katzbachstraße		
3233	Spenden, Katzbachstraße	0 €
	Miete I/ - 10/2020	-4 760 €
2661	Miete II/ - 12/2020	-1 008 €
2665	Energiekosten (Strom)	-1 300 €
2662	Nebenkosten, Katzbachstraße (Versicherung)	-300 €
2664	Einrichtung, Renovierung, Unterhalt	-300 €
2502	Computer, Maschinen, Programme	-400 €
2670	Ausgaben, Katzbachstraße, allgemein	-100 €
	Summe	-8 168 €
Esperanto aktuell		
3235	Spenden, Esperanto aktuell	0 €
8006, 8007	Abonnement, allgemein	600 €
Konto?	Abonnement, DEJ	0 €
6543	Abonnement, Österreich	600 €
6901	Redaktion	-2 400 €
6902	Druckkosten	-4 000 €
6903	Versandkosten, Post	-4 000 €
6904	Verpackung und Versand durch CVS	-1 500 €
	Summe	-10 700 €
Esperanto Unterricht		
3241	Spenden, Esperanto-Unterricht	0 €
6701	Personalkosten, Netto	-5 633 €
6751	soziale Aufwendungen	-2 375 €
2924	Förderung, Kurse, Seminare	0 €
	Summe	-8 008 €
Auswirkung, Pressebeauftragter		
3240	Spenden, Werbematerial	0 €
2552	Personalkosten, Netto	-2 400 €
2820	Werbungskosten (z. B. Messe Werbematerial)	-2 500 €
	Summe	-4 900 €
Esperanto Europa-Arbeit		
3234	Spende, Europa-Arbeit	36 000 €
2558	Personalkosten, Netto	-19 287 €
2544	soziale Aufwendungen	-12 367 €
6702, 6763	Lohnsteuer + Soli	-3 458 €
	Summe	888 €
Landesarbeit		
3249	Spende, Landesarbeit	0 €
2920	Landesverbände, Förderung	-2 500 €
2921, 2931	Ortsgruppen, Förderung	-2 500 €
2923	sonstige Veranstaltungen	-500 €
2821	Rundreisen der Referenten	-500 €
	Summe	-6 000 €
Archivarbeit		
3244	Spenden, Archivarbeit	0 €
2913	Deutsches Esperanto-Archiv	0 €
	Summe	0 €
Esperanto-Bibliotheken		
3242	Spenden, Esperanto-Bibliothek Aalen	0 €
2910	Subvention Esperanto-Bibliothek Aalen	-2 000 €
	Gemeinsamer eOPAC	-288 €
	Summe	-2 288 €



„Indiĝenaj lingvoj“

Germana Esperanto kongreso en Neumünster 07a-10a de Junio 2019

Dua informilo

Jam antaŭ la fino de la unua aliĝkategorio tiom da partoprenantoj aliĝis, ke la tranokteblecoj en la domo estas elĉerpitaj. Kun tiom da bezono en tiom frua tempo ni ne kalkulis.

Pro la okupo kun la silvestra aranĝo Luminesk' ni ne trovis tempon, trakti administrajn aferojn rilate al la kongreso pli frue.

Programo de la kongreso

Je la vespero de la 7-a de junio estos la ebleco renkontiĝi en la salonoj de la kongresejo "kiek in" por ripozi kaj interkonatiĝi. Ĝis la 19:30 estos la ebleco ricevi vespermanĝon en la kantino de la kongresejo.

Sabate la 8-an de junio la kongreso estos oficiale inaŭgurata. La antaŭtagmezo jam estas influata de la kongresa temo "indiĝenaj lingvoj". Sean O'Riain de Eŭropa Esperanto-Unio prelegos kadre de la kongresa temo pri la irlanda lingvo. Por prelego pri la soraba lingvo ni varbis prof. dr. Eduard Werner el Lepsiko. Por akiri plejble multe da publika eĥo en la urbo, ni ofertas publikan posttagmezon kun interesaj programeroj por la enloĝantoj de Neumünster.

Dimanĉe la 9-an okazos la jarĉefkunveno de GEA. Krome estos kelkaj programeroj rilate al la kongresa temo "indiĝenaj lingvoj". Jean-Marc Leclercq, pli bone konata kiel JoMo, sin anoncis por amuzi homojn muzike rilate al la temo.

La partoprenantaj organizoj havas la eblecon aranĝi laborkunsidojn kaj kunvenojn. Pri antaŭa mendo de salono ni petas.

Ekskursa programo

Sabate posttagmeze okazos du programeroj ekstere de la kongresejo en Neumünster: Dum urbogvidado eblos malkovri la urbomezon de Neumünster. Naturamiko povos konkuri la lagon Einfelder See dum 10-kilometra migrado. Ambaŭ ekskursoj kostas 10 €.

Esperanto-Zentrum "Marie Hankel"		
3243	Spenden, EZMH	0 €
2911	Ausgaben, Marie-Hankel-Zentrum, allgemein	0 €
2912	Ausgaben, Marie-Hankel-Zentrum, Miete	-444 €
	Summe	-444 €
Deutscher Esperanto Kongress		
	Summe	0 €
PSI – Internationale Frühlingswoche		
	Summe	0 €
Luminesk		
	Summe	0 €
Deutsches Esperanto-Institut		
	Ein-/Auszahlung	0 €
Sonstiges		
3251	Gezahlte Spenden/Zuwendungen	0 €
4700	4700 Zinsen Vermögensverwaltung	0 €
	Summe	0 €
Vereinsergebnis/Liquiditätsverlust		-5 807 €



„Indigene Sprachen“

Deutscher Esperanto-Kongress in Neumünster 07.-10. Juni 2019

Zweites Informationsblatt

Bereits vor dem Ablauf der ersten Anmeldekategorie haben sich so viele Teilnehmende angemeldet, dass die Übernachtungsmöglichkeiten in unserem Kongresszentrum "kiek in" in Neumünster ausgebucht sind. Mit einem solchen Ansturm hatten wir zu dieser frühen Zeit nicht gerechnet. Auch haben sich die Teilnehmenden so früh angemeldet, dass insbesondere wegen des über Silvester stattfindenden Luminesk' unsere Kapazitäten gebunden waren und wir erst im neuen Jahr auf die vielen Anfragen reagieren können.

Programm des Kongresses

Am Abend des 07. Juni wird es die Möglichkeit geben, sich in den Räumlichkeiten des "kiek in" zu treffen und von der Anreise zu erfrischen. Bis 19:30 Uhr wird es in der Mensa des Hauses Abendessen geben.

Am Samstag, 08. Juni wird der Kongress offiziell eröffnet. Der Vormittag wird bereits vom Kongressthema "Indigene Sprachen" geprägt sein. Sean O'Riain von der Esperanto Europa-Union wird im Rahmen des Kongressthemas über die Irische Sprache vortragen. Für einen Vortrag über die sorbische Sprache haben wir Prof. Dr. Eduard Werner aus Leipzig gewinnen können.

Um eine weithin wahrnehmbare Außenwirkung zu erzeugen, wird es am Samstagnachmittag dazu einen öffentlichen Programmpunkt für die interessierte neumünsteraner Bevölkerung geben.

Am Sonntag, 09. Juni findet die Jahreshauptversammlung des DEB statt. Weiterhin werden im Kongresszentrum Programmpunkte zum Thema "Indigene Sprachen" angeboten.

Für den Abend hat sich Jean-Marc Leclercq, besser bekannt als JoMo, angesagt, um das Kongressthema auf musikalische Weise aufzugreifen.

Teilnehmende Organisationen können im Kongresszentrum ihre Arbeitssitzungen abhalten. Um Voranmeldung wird gebeten.

Ausflugsprogramm

Am Samstagnachmittag wird es zwei Programmpunkte außerhalb des Kongresszentrums geben: Während einer Stadtführung kann die Innenstadt von Neumünster entdeckt werden. Naturfreunde kommen bei einem Rundgang um den Einfelder See (ca. 10 km) auf ihre Kosten. Beide Ausflüge sind für etwa 10 Euro zu buchen.

Am Sonntagnachmittag gibt es die Möglichkeit, zwei touristisch interessante Städte in der Umgebung zu besuchen: Hamburg und Lübeck. In beiden Städten wird es eine Stadtführung geben. Beide Ausflüge sind für 20 Euro zu buchen und beinhalten die An- und Rückreise mit dem Zug

Dum la dimanĉa posttagmezo estos la ebleco viziti du interesajn urbojn proksimajn: Hamburg kaj Lübeck. Ambaŭ ekskursoj estas mendeblaj kontraŭ 20 € kaj enhavas al-kaj revojaĝon per loka trajno kaj la urbogvidado. Aldonaj elspezoj surloke estos mem pagendaj.

Vojaĝo al la kongresa urbo Neumünster

Neumünster estas kaj per trajno kaj per aŭtomobilo bone atingebla. Per la aŭtoŝoseo A7 la urbo estas bone ligita al la longdistanca stratoreto. Ĉe la stacidomo Neumünster haltas multaj longdistancaj trajnoj; dum la pentekosta vendredo oni atingos Neumünster ekz. de Frankfurt/Main kaj Düsseldorf dum 4:30 horoj kaj de Berlino kaj Kassel dum 3 horoj sen ŝanĝo. Plej proksima flughaveno estas Hamburg.

